

SCIENCA REVUO de
Internacia Sciencia
Asocio Esperantista
BEOGRAD, Jugoslavio

El Vol. 26
n-ro 4/5 (114/115)
30.10.1975.

LA FRAZAKCENTO EN ESPERANTO^{§/}

(W.A.V.Themaat, AMSTERDAM, Nederlando)

1) LA BAZA MATERIALO

En mia artikolo "La vicordo de la frazelementoj en Esperanto" (en la sekvo nomata VFE) mi jam tuŝis la demandon, ĉu la vortordon en Esperanto influas ne ankaŭ la frazakcento, t.e. ĉu la plej akcenta kaj la dua plej akcenta frazelementoj ne staras pli ofte ol aleatore frazkomence aŭ frazfine, kaj ĉu inversio ne okazas pli ofte ol aleatore por meti la plej akcentan frazelementon en la komencon aŭ finon de frazo. Sed ĉar en presitaj tekstoj la frazakcento ne estas indikita, mi devis rezervi tiujn demandojn (kune kun aliaj koncernantaj la frazakcenton) por aparta studo, la nuna.

Unu el la testindaj hipotezoj estas tiu de la "du honoraj lokoj", t.e. tendenco al plej forta akcentigo de la unua kaj lasta frazelementoj, anata de pluraj aŭtoroj por pluraj lingvoj. Laŭ Firbas (p. 117) en la ĉeĥa lingvo la normala

^{§/} Mi dankas S-ron Roger Bernard pro lia helpo por la eksperimento kun francaj provpersonoj, ĉiujn provpersonojn kaj la Matematikan Centron en Amsterdam por la disponigo de komputilo por certaj kalkuloj.

vortordo en neemociaj frazoj estas temo - remo (do kun la ĉefakcento en la fino), sed en emociaj frazoj ĝi povas iĝi remo - temo (do kun komenca ĉefakcento, kiel en la angla lingvo *Long live the king!* (*Longe vivu la reĝo!*)). Laŭ Weil (p. 82) la suprenira akcentigo estas dominanta al ĉiuj lingvoj, tre forte en la franca (p.76) kaj en la latina lingvo la favorataj lokoj por la ĉefakcento estas la komenco kaj la fino de la frazo (p. 87), kvankam ekzistas multaj esceptoj (Marouzeau, p. 139). Laŭ Bresnan (p. 257) la ĉefakcenton en la normala intonacio por anglaj frazoj havas la plej dekstra konstituanto.

Tial mi klopodis determini (kiom tiuj nocioj estas bone difinitaj) en la esplorataj frazoj la frazelementojn kun ĉefa kaj dua frazakcentoj.

Frazakcento estas unue eco de teksto parolata ne skribita. Tial en interparolo kun la fonetikisto Hubers (2a de novembro 1971) mi decidis igi provpersonojn indiki la ĉefan kaj duan frazakcentojn en ĉiu frazo de tekstoj aŭdigataj de sonbendoj. La intonacion metitan de la parolinto en la tekston povas influi lia gepatra lingvo; ankaŭ la intonacion aŭdatan de la aŭdantoj povas influi ilia gepatra lingvo. Tio faras dezirinde sufiĉan diversecon de la gepatraj lingvoj tiel de la aŭtoroj tiel de la provpersonoj.

Esperanton influas ĉefe la tri ĉefaj Eŭropaj lingvofamilioj: la latinida, la ĝermana kaj la slava; tial estis dezirinde, ke tiel la aŭtoroj kiel la provpersonoj reprezentu tiujn tri lingvofamiliojn.

Por la provpersonoj kiel reprezentanton de la ĝermana lingvofamilio mi elektis la Nederlandan, pro facileco de eksperimentado: tiam mi mem povis fari la eksperimenton per esperantistoj el mia ĉirkaŭaĵo.

Kiel reprezentanton de la latinidaj lingvoj mi elektis la francan, pro la forta Esperantomovado en Francujo. Mi trovis s-ron Bernard preta fari la eksperimenton kun francaj provpersonoj.

Kiel reprezentanton de la slavaj lingvoj mi elektis la polan, pro la forta Esperantomovado en Pollando kaj pro la fakto, ke Pollando estis la naskiĝlando de Zamenhof. Fakte mi kontaktis kelkajn polajn esperantistojn, de unu el ili eĉ ricevis promeson de kunlaboro kaj sendis al li sonbendon kaj plenigendajn tekstfoliojn. Sed eĉ post pli ol jaro mi ne rericevis la rezultojn de lia eksperimento. Tial mi decidis kontentiĝi per la rezultoj de la Nederlandaj kaj la francaj provpersonoj.

En la tekstoj krom diverseco de la gepatra lingvo de la aŭtoro ankaŭ diverseco de tekstogenro estis dezirinda. Sed mi ne trovis pretaj sufiĉajn provpersonojn indiki frazakcentojn en tekstaro tiel ampleksa kiel tiu por VFE. Ankaŭ iom gvidate de la disponebleco de sonbendoj mi elektis la jenajn tekstojn (post ĉiu el ili mi indikis la gepatran lingvon de la aŭtoro, ĝian lingvofamilion kaj la tekstogenron):

- A I. Lapenna, La grandeco de D-ro Zamenhof, serbokroata, slava, parolado;
 B P. Thorsen, Mi vizitas mian farmon, dana, ĝermana, poezieca prozo;
 C Pola radio, Renkonto kun Varsovio, pola, slava, vortmuziko (priskribo kun enmiksitaĵoj);
 D E. Privat, Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado, franca, latinida, parolado;
 E Pola radio, Krakovo, pola, slava, priskribo.
 (mi mendis la sonbendojn A, B kaj D; la sonbendojn C kaj E mi kunricevis).

Hubers indikis kiel dezirindan nombron da provpersonoj 10. Sed Bernard povis trovi nur 5 provpersonojn. Mi pritraktis ĉiujn 5 tekstojn en 2 sesioj, en la unua sesio la tekstojn A, B kaj D, en la dua sesio la tekstojn C kaj E. La provpersonoj en la du sesioj ne estis la samaj; inter la provpersonoj en la dua sesio estis unu denaska germano (do almenaŭ ĝermanlingvulo).

Bernard ne trovis siajn provpersonojn pretaj por du sesioj; en unu sesio li pritraktis la tekstojn A, B kaj C.

Do mi havis la jenajn foliojn:

Teksto	Nederlandaj	francaj
A	9	5
B	9	5
C	7	5
D	8	0
E	7	0

La provpersonoj ricevis po tekstfolion kun indikitaj limoj inter la frazoj (por miaj kriterioj por la limo inter la frazoj vidu VFE; normale la limon inter frazoj indikas .;? aŭ !: se tia ne estas inter du frazoj, mi intermetis /). La eksperimentgvidanto aŭdigis ĉiun frazon, tiam haltis por lasi al la provpersonoj tempon por indiki la frazelementojn kaj poste transiris al la sekvonta frazo.

Ne ĉiam la provpersonoj indikis la akcentojn laŭ la priskriboj. Tiam mi traktis la akcentojn kiel neindikitajn, do ĉiun frazelementon kiel senakcentan.

Por statistika prilaboro mi atentis nur, kiuj frazelementoj estas akcentitaj. Pri la divido en frazelementojn vidu denove VFE. Por ĉiu frazelemento laŭ la indiko de ĉiu provpersono ekzistas kvar ebloj:

- 1) Ĝi entenas tiel la unuan kiel duan plej akcentajn vortojn (kompreneble malsamajn: duoblan akcenton);
- 2) Ĝi entenas la unuan plej akcentan vorton;
- 3) Ĝi entenas la duan plej akcentan vorton;
- 4) Ĝi entenas neniun akcentan vorton.

Ĉiun el tiuj kvar ebloj mi nomas la akcento de frazelemento.

2) LA HIPOTEZOJ TESTINDAJ

La hipotezoj estas duspecaj: hipotezoj pri la meza akcento kaj pri la devioj de la meza akcento.

Por teksto kun nur Nederlandaj provpersonoj en frazo la frazelemento kun la meza unua frazakcento estas la frazelemento, al kiu la pli multaj provpersonoj donis la unuan akcenton, la frazelemento kun la meza dua frazakcento estas la frazelemento, al kiu la pli multaj provpersonoj donis la duan akcenton. La ceteraj frazelementoj estas meze senakcentaj.

Por teksto kun tiel Nederlandaj kiel francaj provpersonoj mi nomas la nombron da Nederlandaj provpersonoj N kaj la nombron da francaj provpersonoj F. La totala Nederlanda provpersonaro havas la saman pezon kiel la franca. La nombro da "voĉoj" por la unua (resp. dua) akcento de certa frazelemento estas la nombro da Nederlandaj voĉoj por ĝia unua (resp. dua) akcento F, la nombro da francaj voĉoj por ĝia unua (resp. dua) akcento N. La frazelemento kun la meza unua (resp. dua) akcento estas la frazelemento kun la pli multaj voĉoj. La akcenton de iu frazelemento laŭ la plimulto de la Nederlandaj (resp. francaj) provpersonoj mi nomas ĝia Nederlanda (resp. franca) akcento.

Grandan rolon en la prijuĝo de la hipotezoj pri la meza akcento ludas la komparo de la fakta ofteco de certa trajto kun la aleatora ofteco. La aleatora ofteco de certa trajto de la meza akcento en certa frazo estas la ofteco de tiu trajto atendenda, se ĉiuj atribuoj de frazakcentoj al vortoj estus konsiderataj egale verŝajnaj.